

Kio ankoraŭ vizitindas en Portugalio ?

Aŭskultante koncertojn, interalie de *fado*-muziko, dum la solena malfermo de la 103-a UK kaj poste en la taverno *Tasca do Chico* (rekomendita de vera *Alfacinha*, tio estas *aŭtenta persono* de Lisbono) kaj de surstrataj muzikistoj en malnovaj kvartaloj de Lisbono kaj Porto, ni ĝuis muzikon de loke popularaj instrumentoj: *a guitarra portuguesa* (esp. [portugala gitaro](#)), *o cavaquinho* (esp. [kavakinjo](#)) kaj *o ukulele* (esp. [ukulelo](#)) - etaj gitaroj, kaj *a concertina* (esp. [concertino](#)) - eta akordeono. Por aŭskulti tiun muzikon rekte indas veni al Portugalio!

Sciindas, ke la termino *Alfacinha* venas de la fakto, ke en la regiono de Lisbono la laktuko (port. *alface*) estas abunda planto, kaj konsiderinte la araban originon de la vorto, ĝi estis grandskale kultivita tie dum la islama periodo.

Dum la kongreso mi aĉetis kelkajn kompaktdiskojn kaj nun kun plezuro mi aŭskultas ilin. Nome kanonojn de la ensemblo *Kajto* kaj la portugaliajn *fado*-koncertojn, interalie *fado da Senhora*. Kelkajn eblas aŭskulti ankaŭ pere de *jutubo*. Ambaŭ el ili, tiujn melankoliajn kaj tiujn ĝojplenajn. Ekzemple: koncerto de la ensemblo [Madredeus](#) en la filmo *Lisbona rakonto*, [A andorinha da primavera](#) (esp. *La unua hirundo*) de Teresa Salgueiro, [Marcha da Esperança](#) (esp. *La marŝo de espero*), [Fado Do Contra](#), kaj [Balelas](#) de Cuca Roseta, [Fado Dançado](#), kaj [Desfado](#) de Ana Moura, [Fado à Janela](#) de Marco Oliveira, kaj [Fado Português](#) de Amália Rodrigues. Danke al la koncertoj kaj prelegoj okazintaj dum la UK, mi eksciis, ke funkcias du tipoj de *fado* – tiu de Lisbono kaj la alia de Coimbra, kiuj esprimas diversajn emociojn kaj estas kantataj aŭ nur de viroj aŭ ankaŭ de virinoj. La muziko esprimas t.n. *saŭdado-n* (port. *saudade*) - "nostalgian sopiron", "mildan malgajon" aŭ "rememoron pri mankanta ĝojo" tamen ĝin spertas ankaŭ ĝojplenaj homoj. La vorto devenas de la latina solitudo ("soleco") sed la signifo evoluis for de la origina signifo. Ofte la objekto de la sopiro estas perdita naskiĝtero (pro la historia emo de portugaloj elmigri al fremdaj landoj) aŭ perdita amo. La vorto ofte portas nuancon de ruiniĝo kaj esprimas la subpremitan scion ke la sopirata afero povus neniam reveni. Ĝi estas multe uzata en la portugala-lingvaj literaturo, tradiciaj kantoj, popola muziko kiel la portugala *fado*, aŭ la brazila *bossa nova* (esp. *bosanovo*, laŭvorte *nova ondo*) ktp.

Miaopinie Portugalio estas tre kreemaj, kio videblas en la portugala kulturo: antaŭ ĉio en muziko kaj en plastaj artoj (ekzemple kaŝeloj, emajlitaj kaj ornamitaj per bildo t.n. [Azulejos](#) (esp. *Azuleĥoj*) kaj la surtera mozaiko t.n. [Calçada portuguesa](#)). Nepre aŭskultu koncertojn kaj rigardu la arton vizitonte tiun landon. Portugalio estas la aŭtoroj de multaj inventoj, inkluzive la [karavelo](#) - rapida kaj sekura velŝipo, la [astrolabio](#) - astronomia mezuraparato antaŭe uzata en navigado, la *logo* - mezurilo,

kiu determinas la rapidon de movado de ŝipo kaj la distancon, kiun ĝi transpasas, *la noniuso* – helpilo pliiganta la precizecon de mezurlegado sur la ĉefa skalo kaj aliaj.

Dum vizito al Porto kun granda plezuro ni boatumis tie laŭ la rivero *Duoro* (esp. *Doŭro*), ni vidis malnovajn boatojn t.n. *rabelo* uzatajn por transporti barelojn de vino, veturis per telfero, rigardis grandegajn defendmurojn kaj admiris belegajn murojn de *la Kapelo al S-ta Katerino* kaj internon de la fervoja stacidomo *Estação Ferroviária de São Bento* dekoritajn per belaj *azuleĥoj*. En la urbo vizitindas ankaŭ ĝardenoj de iama Kristala Palaco sed mankis jam tempo por iri tien. Aliaj kongresanoj dum la ekskursita tago merkrede vojaĝis al *Évora* (esp. *Eboro*) - iama roma komunumo kun multaj antikvaĵoj, *Coimbra* (esp. *Koimbro*) - studenta urbo kun la plej malnova portugala universitato, kaj iama ĉefurbo de Portugalio, *Fátima* - unu el la plej popularaj pilgrimcentroj en Eŭropo kaj al *Arrábida* - bela naturparko: verda montaro apud maro nur kelkdek kilometrojn for de Lisbono.

Antaŭ kelkaj jaroj mi vojaĝis al la portugala insularo *Açores* (esp. *Acoroj*) por supreniri la plej altan monton de Portugalio, la volkanon *Montanha do Pico* enkadre de la projekto „vizitu la plej altajn pintojn de Eŭropunio”, kaj kune kun mia amiko mi supreniris tiam ankaŭ la pintojn *Pico da Esperança* kaj *Pico Verde* pri kio oni povas legi en la [aparta teksto pri Acoroj](#).

Mi ŝatus iam viziti en Portugalio ankoraŭ la urbon *Aveiro* - tiel nomatan “la portugalan Venecion”, kies malnova urbo situas super la kanaloj tra kiuj veturas multkoloraj (buntaj) boatoj kun alte levitaj pintoj, belegajn sablajn strandojn (plaĝojn) en *Algarve*, la arkipelagon *Madejro* nomatan “la paradiza ĝardeno” pro sia beleco kaj *Faro*, kie la alvenantojn ‘salutas’ grandegaj muroj kaj ŝtonaj pordegoj, kiuj iam protektis la urbon. En la kvartalo *Ribeirinho* de la urbo troviĝas la *Kapelo de Ostoĵ* (*Capela dos Ossos*), kie ripozas la ostoj de pli ol 1000 monaĥoj. Ĝi estas unu el tri tiaj kapeloj en Eŭropo. La aliaj troviĝas en la ĉefa urbo *Kutná Hora* kaj en la pola urbeto *Kudowa Zdrój*.

Verkis: AdamWilkus